Sesioj de AIS. Por tiu ĉi jaro la SUS en Rimini/San Marino estas jam definitive fiksita. Tie la Ĝenerala Asembleo devas elekti novan Senaton, kiu decidos pri la prezidanto.

La departemento en Sibiu komencas sian laboron en la periodo 2003-2004 kaj pro tio okazu tie enkonduka semajno ekde vendredo, 26.9.2003, ĝis sabato, 4. 10. 2003.

Kolego Leonov (kiel gasto por tiu ĉi punkto) proponis okazigi provSUSon en Karlovo en tiu ĉi aŭtuno. Li je koncerna demando komunikis, ke problemo pri registro de AIS-titoloj probable ne estos, sed jes pri ŝtata agnosko. Necesas tiucele kontrakto kun ŝtata instanco, ekzemple universitato en Burgas. La Senato decidas okazigi en ĉi tiu jaro provSUSon en Karlovo (BG) inter SUS 26 en Rimini/San Marino kaj la enkonduka semajno en Sibiu.

Alvokoj. PDoc. Vera Barandovska-Frank kaj PDoc. Martin Haase estas alvokitaj de la Senato kiel AProf.

Pri klerigejoj de AIS. Kolegino Poláková proponis, ke AIS mem fondu klerigejon en Komárno (ekzemple en formo de asocio kun limigita respondeco). La Senato decidis, ke AIS provu daŭrigi sian laboron en Nitra/Komárno kaj alstrebu tie ŝtatan agnoskon.

La klerigejo Ruthenia intencas kunfandiĝi kun la privata klerigejo INFO al klerigejo INFO-Ruthenia, kiu probable baldaŭ estos ŝtata. Laŭ lia propono la malnova AIS-kontrakto estu transprenita al nova tiel ekestonta AIS-klerigejo. La Senato tamen proponas adapti la kontrakton, ekzemple 20 novaj studentoj jare aliĝu al AIS kun studenta legitimilo. Ekzamenoj (BUSoj) en Moskvo ankaŭ estas estonte okazigeblaj. Per aklamo la Senato subtenas la agadon.

La filio Roslavl petas pri subteno rilate siajn agadojn, precipe konfirmon konstatantan kunlaboron kun AIS por enretigi klerigkibernetikan instrumaterialon. Ankaŭ tion la Senato akceptas per aklamado.

Konstitucio. La de la prezidanto prezentitan skriban proponon de nova konstitucio la Senato ne povis pritrakti, ĉar mankis tempo por trastudi la tekston. Tial rekomendo al la Ĝenerala Asembleo ne eblis. (Necesas tri kvaronoj da voĉoj de la Ĝenerala Asembleo por aprobi novan konstitucion.)

Acta Sanmarinensia. La Senato rekomendas al gekolegoj Lewoc kaj Holdgrün daŭrigi la laboron rilate al Acta Sanmarinensia. La Senato petas la Subtenan Sektoton ebligi daŭre la aperigon de tiu periodaĵo.

Protokolis:
H. S. Holdgrün,
Protokol- kaj Publikigofico

Protokolo de la Ĝenerala Asembleo okazinta en Sibiu en la Lucian-Blaga-universitato. Dimanĉo, 23.2.2003, 12:00-13:00h.

Formalaĵoj. La tagordo estas akceptita. Voĉojn havas (laŭ stato je la 16a februaro 2002): Fössmeier 2, Frank 4, Holdgrün 2, Lobin 1, Minnaja 4, Penna-

cchietti 1, Quednau 2, Viereck 1). Tiu konstato estas akceptita kun unu sindeteno.

Apelacio. Kandidatino Faloba pro privataj kialoj ne sukcesis rilate al sia doktoriĝa tezo plenumi ene de du jaroj la kondiĉojn starigitajn de la ekzamenkomitato dum ŝia ekzameno. Ŝi petas pri prokrasto de la limdato. La Ĝenerala Asembleo akceptas unuanime kun du sindetenoj. La nova limdato estos la SUS en San Marino en tiu ĉi jaro 2003.

Financa raporto. Kolego Lobin kiel revizoro prezentas la financan situacion de AIS. Inter alie pro manko de skriba prezentado ne eblis facile sekvi la raporton kaj ties detalojn. Laŭ informo de la prezidanto la impostofico intencas ne plu agnoski la komunutilecon de AIS; sekve la donacoj en Germanio ne plu estas subtraheblaj ĉe la impostdeklaro de la donacinto. Post la raporto de la revizoro la Ĝenerala Asembleo aprobas la laboron de la financofico, sed postulas refaradon de la bilanco por 2001 kaj 2002, por ke estu klare, ke eblas konservi la komunutilecon. La Ĝenerala Asembleo rekomendas konsulti specialistojn pri tio, se ties honorario ne superas 200 Eŭrojn. Por la jaro 2001 la trezoristo estas unuanime senŝarĝita.

Konstitucipropono. Montriĝas, ke la konstituciŝanĝo postulas pli da preparlaboro. Tial estas starigita komitato, kiu okupiĝu pri ĝi laŭ la prezentita de la prezidanto teksto, kun definitiva vortigado. Se la membroj de la komitato samopinias pri unuopaj punktoj, tiam ĉi tiuj punktoj estu akceptitaj. Alikaze okazu voĉdonado de la Ĉenerala Asembleo pri ellaboritaj alternativoj. Al la komitato apartenu la kolegoj Alsleben, Bormann, Frank, Holdgrün, Minnaja, Quednau kaj Ŝilo.

Pri la *laborplano 2003* okazis neniu decido.

Aliaj proponoj. Kolego Quednau petas plilongigon de la valideco de la BUS-regularo. La Ĝenerala Asembleo akceptas tion. Krome estu forigita la konfuziga tajperaro en tiu regularo.

Pro manko de tempo aliaj punktoj ne plu estis trakteblaj resp. akcepteblaj.

Protokolis:
H. S. Holdgrün,
Protokol- kaj Publikigofico

Protokolo de la 50a senatkunsido (44a post la oficialigo de AIS fare de la Konsilio de la XII, 53a post la fakta eklaboro) okazinta en la paroĥejo de S-taj Paŭlo kaj Johano, Rimini / San Giuliano Mare (IT).

Dimanĉo, 2003-08-31, 10:00 h – 12:30 h,
lundo, 2003-09-01, 21:40 h - 23:00 h,
mardo, 2003-09-02, 16:00 h – 19:00 h,
ĵaŭdo, 2003-09-04, 20:45 h – 24:00 h.

Ĉeestantoj: senatanoj Fössmeier, Frank, Holdgrün (ne je 08-31), Lewoc (ne je 08-31), Minnaja, Quednau, Pennacchietti; vicsenatano Angstl (parte). Kolego Wickström antaŭe anoncis sian neĉeeston, kolego Maitzen ne povis veni pro gravaj kaj neantaŭvideblaj personaj kialoj.

1. **Formalaĵoj**. Laŭ antaŭa decido la protokoloj estu faritaj tiel, ke ili povu aperi en la sekva ankoraŭ ne finfarita numero de la revuo GrKG/H; tiel ne okazis pri la protokoloj de la februara sesio en Sibiu. Tial laŭdecide la informofico transprenas la protokoladon.
2. **SUS-programo kaj -organizado**.

2.1 La senato decidas, ke pri la eldono de kursatestoj kaj aliĝo al kursoj respondecas nur la klerig-ofico. Dum SUS 26 la klerig-ofico transprenu ankaŭ la enkasigon de la ekzamen- kaj SUS-kotizoj, se iuj restas pagendaj. Tiu decido okazas antaŭ la alveno de OProf. Holdgrün, kiu post sia alveno proponas nuligi ĝin. Tiun nulig-proponon la senato malakceptas per kvar voĉoj kontraŭ tri ĉe unu sindeteno.

2.2 Dum SUS 26 la ekzamenofico konsistu el jenaj personoj:

	konstantaj membroj	aldonaj membroj
Sekcio 1	OProf. Fössmeier	OProf. Frank
Sekcio 2	OProf. Pennacchietti	OProf. Korĵenevskaja-Gouriou
Sekcio 3	OProf. Holdgrün	OProf. Minnaja
Sekcio 4	OProf. Angstl	-
Sekcio 5	OProf. Maitzen	OProf. Quednau
Sekcio 6	OProf. Lobin	OProf. Poláková

2.3 Anstataŭ la kurso de la ne alveninta prof. Ŝilo okazu kurso de OProf. Angstl en sekcio 4, kun la titolo „Baza enkonduko en la propoz-logikon kun ekzemploj kaj ekzercoj“. Ĉar la aliĝintoj de *symposium latinum* ne povis veni, la kurso de PDoc. Barandovská-Frank okazu en ILo en sekcio 2, kun la titolo „De Latino sine flexione centjara“.

2.4 La akademia forumo okazu sub la temo „La tria jardeko de AIS: Kio estas atinginda, kio estas atingebla, kio estas atingenda?“ Gvidu la forumon OProf. Pennacchietti.

2.5 La senato unuanime proponas al la ĜA jenan proceduron por la elekto de la vic-senatanoj kaj ilia vicordo: Por elekti n vicsenatanojn ĉiu voĉdonanto povu doni al siaj preferataj kandidatoj po nombron inter 1 kaj n, sed rajtas uzi ĉiun nombron nur unufoje. Por ĉiu kandidato oni adicias la ricevitajn nombrojn; la kandidatoj

kun la *n* plej altaj sumoj estas elektitaj. Pli alta sumo donas prioritaton en la vic-ordo.

3. Post la alveno de kolegoj Holdgrün kaj Lewoc protokolanto Fössmeier laŭtlegas por ili la faritajn decidojn. ADoc. Lewoc proponas, ke Fössmeier faru la protokolon kiel ano ne de la inform-, sed de la protokol-ofico. La propono estas rifuzita per 5 kontraŭ 2 voĉoj.
4. **Premio Pirlot**: La forestanta direktoro de la honorofico proponu al la Senato almenaŭ du verkojn por reta decido pri la atribuado de Premio Pirlot.
5. **Alvokoj**. ADoc. Dr. Butan plenumas la kondiĉojn por akiri la rangon de plenrajta docento laŭ maniero V (RD 5.3). OProf. Pennacchietti kiel estro de la docentig-komitato rekomendas ŝian alvokon. La senato unuanime akceptas kaj bonvenigas la novan efektivan membron.
6. **Studado**.

6.1 La senato unuanime aprobas la kadran regularon por docentiga studadkompletigo verkitan de OProf. Poláková kaj OProf. Frank kaj komisias al ili, kune kun la honora senatano OProf. Selten detaligi la studadplanon konsiderante la disponeblan kapaciton.

6.2 La senato rekomendas al la Ĝenerala Asembleo preskribi per la reviziotaj regularoj, ke finstudinteco sur nivelo inter du niveloj difinitaj por la kvar gradoj de AIS (ekzemple diplomo de germana fak-altlernejo, kiu estas pli proksima al magistreco ol al bakalaŭreco) estu adapte adoptebla sur la pli alta nivelo, se la kandidato aŭ akiras adekvatan kvanton da kromaj studunuoj (laŭ decido de la ekzamenofico, ne malpli ol 10 kaj ne pli ol duonon de la kvanto necesa por originala akiro de la celata grado) aŭ finis la studon, kies adaptan adopton li celas, per tre bona (10/10) aŭ almenaŭ bona (9/10) rezulto.

6.3 La senato decidas, ke partopreno en kursfinaj ekzamenetoj eblas ankaŭ sen partopreno en la koncerna kurso; tiaokaze por sukceso necesas almenaŭ rezulto de 7/10.

7. **Klerigejoj**. La senato konstatas, ke momente ekzistas aŭ ekestas tri funkciantaj filioj kun klerigejoj de AIS:
   A) la rumana filio kun la fakultat-departemento en Sibiu-Hermannstadt sub la gvidado de OProf. Frank, OProf. Minnaja kaj ADoc. Konnerth-Reisenauer,
   B) la slovaka filio kun la starigata Libera Eŭropia Universitato Komárno sub la rektoreco de OProf. Selten HMdAIS, OProf. Poláková kaj OProf. Frank,
   C) tria tia filio kun klerigejo en Karlovo, por kiu ĝis nun estas nomumitaj du eksterordaj profesoroj (ADoc. Leonov kaj ADoc. Lewanderska). Tria EProf. por tiu filio fariĝu prof. Ralev, rektoro de la ŝtata universitato de Burgaŝ (BG).

   Rilate la restarigon de la pola filio la senato komisiis la necesajn preparlaborojn al EProf. Lewanderska-Quednau.
8. OProf. Minnaja **demisias** kiel direktoro de la ekzamen-ofico. La senato elektas kiel novan direktoron OProf. Lobin.

Protokolis:
OProf. Reinhard Fössmeier
Rimini, 2003-09-06

Protokolo de la Asembleo de la Subtena Sektoro dum SUS 26

Rimini, paroĥejo de S. Giuliano Mare, 2003-08-31, 16:00-17:30 kaj 2003-09-04, 17:00-18:00

Ĉeestaj kaj delegitaj voĉoj: Frank 7, Fössmeier 4, Poláková 3, Quednau 3, Lobin 2, Barandovská 1, Simonnet 1. Kvorumeco nepridubita, laborlingvo ILo, protokolanto Barandovská, tagordo laŭ la invito (GrKG/H 2003/44/2, p. 120). Okazis jenaj decidoj:

1. La kurzo de la AKU restu 1 AKU = 65 Eŭroj
2. La asembleo ekscias pri la retiriĝo de estrarano ASci. Piotrowski hon.prof. el ĉiuj siaj oficoj en AIS, dankas lin pro sia ĝisnuna engaĝiĝo kaj elektas kiel kvinan estraranon por la resto de la deĵorperiodo la dumvivan subtenan membron ADoc. Simonnet. La asembleo rekomendas al AIS Deutschland, elekti kiel trian estraranon anstataŭ kolegon Piotrowski kolegon OProf. Dr.habil.Foessmeier. La asembleo rekomendas al la societanoj de Akademidomaro GmbH, elekti kiel duan afergvidanton apud kolego Piotrowski (aŭ, se ĉi tiu ankaŭ retiriĝas el ĉi tiu ofico, kiel ununuran, novan afergvidanton) Dr. Macko aŭ ISK Hardegger, kondiĉe ke la elektoto antaŭe fariĝu societano. Se neniu el ambaŭ pretas fariĝi societano kaj afergvidanto, oni kunigu la oficojn de trezoristo de AIS kaj de afergvidanto de Akademidomaro GmbH.
3. Pri la finkalkulo kaj la bilanco de 2002, same kiel pri la buĝetproponoj 2003 kaj 2004 ne eblas decidi en la foresto de la trezoristo, ĉar ne estas en ĉiuj kazoj evidenta, kiuj adiciatoj

koncernas la Subtenan Sektoron, kiuj la Sciencan Sektoron, kaj pri kiom de adiciatoj koncernantaj ambaŭ sektorojn rajtas decidi la asembleo de la Subtena Sektoro. La asembleo konfidas al la estrarano Frank kaj al la revizoroj interkonsenti kun la trezoristo pri disdivido konforma al la decido de Praha kaj pri vortigo komprenebla ankaŭ de negermanlingvaj subtenaj membroj. La interkonsento respektu la pluajn decidojn pri 2003 resp. 2004 kaj validu kiel senŝarĝigo de la trezoristo kaj de la estraro.

4. La Asembleo rekomendas al la trezoristo kune kun la prezidanto, jure plendi kontraŭ la verdikto de la financofico Paderborn, malagnoski la komunutilecon de AIS Germanio pro la evidente malĝusta precipa argumento, ke okazis en la pasintaj tri jaroj neniuj aktivecoj en la germana lingvoregiono, al kiu ja tute oficiale kaj evidente ankaŭ apartenas Hermannstadt. Ne atendante ĝis la esperebla sukceso de la plendo la estraro ekzamenu, ĉu ekzistas laŭleĝa vojo de pli favora moninvesto.
5. La Asembleo decidas investi laŭeble jam 2003, plej malfrue 2004 de la rezervoj antaŭviditaj por la membreckotizo de dumvivaj subtenaj membroj 21/25 = 84%n en la nemoveblaĵojn akiritajn, akirotajn aŭ realigotajn por la Akademidomo en Komarno, ĉu senpere en studion de la Subtena Sektoro, ĉu kiel pluan parton de la AIS-kapitalo en Akademidomaro. La asembleo rekomendas al la societanoj de Akademidomaro, akiri studion en la Akademidomo Komarno, eventuale per plialtigo de la societa kapitalo aŭ per varbado de komanditistoj unuavice inter la societanoj. La Asembleo petas la Ĝeneralan Asembleon de la Scienca Sektoro, aliĝi *mutadis mutandis* al ĉi tiu decido.
6. La Asembleo proponas al la Ĝenerala Asembleo, elekti kiel revizorojn, kontrolantaj la mastrumadon de la Akademio en la deĵorperiodo 2004 – 2007, (1) OProf. Dr. Lobin (2) OProf. Dr. Weeser-Krell HMdAIS, kaj kiel vicrevizoron (3) ASci. Dr. Macko /ISK Hardegger.
7. La Asembleo aĉetas el siaj buĝetoj 2003 kaj 2004 por ĉiu subtena membro, kies membreco en la koncerna jaro ne ŝvebas, la jare kvar kajerojn de la revuo GrKG/H kaj laŭeble ankaŭ eventualajn kromvolumojn, ambaŭ kun interkonsentota rabato ne malsuperanta la rabaton agnoskitan al librovendejoj, kaj investante por ĉiu subtena membro tiucele en ĉiu jaro maksimume 30 Eŭrojn. Krome estu laŭ la samaj kondiĉoj aĉetataj la (normale 4) kajeroj de acta sanmarinensia, tiucele investante maksimume 25 Eŭrojn jare. Por senatanoj, vicsenatanoj kaj dekanoj, kiuj ne mem abonas la revuon GrKG/H kun la oficialaj sciigoj de AIS kaj ricevas la revuon jam kiel subtenaj membroj de AIS aŭ kiel membroj de TAKIS, la SubS aĉetu ekde 2003 la jare kvar kajerojn (sen la eventualaj kromvolumoj). Tiu ĉi decido validu ankaŭ por 2005 kaj la sekvaj jaroj, se ĝi ne estas ŝanĝita de estonta kunsido de la Asembleo.
8. La Asembleo elektas por la deĵorperiodo 2004-2007 la jenajn 5 estraranojn: OProf. Wickstroem, ADoc. Tuĥvatullina, OProf. Frank, Prof[T] Ŝilo, ADoc. Simonnet. Anstataŭantoj estu PDoc. Barandovská kaj OProf. Angstl. Ĝi rekomendu al la estraranoj, elekti kiel direktoron OProf. Wickstroem.
9. La asembleo rekomendas por la rolo de Garantianto laŭ artikolo 17.7 de la konstitucio de 2003-05-19 OProf. Pennacchietti, kaze ke li ne plu estos senatano, alikaze ADoc. Simonnet.
10. La Asembleo agnoskas la valoran laboron de la landaj asocioj slovakaj, rumanaj kaj bulgaraj por la realigo de la ĉijaraj studadsesioj kaj kovros eventualajn kotizŝuldojn ekzistantajn en 2003. La samo validu por la landa asocio pola, se ĝis la Asembleo de la Subtena Sektoro okazonta dum la prov-SUS en Karlovo estos sciata la konsisto de la koncerna estraro kaj la listo de la membroj.

Rimini 2003-09-04
Protokolis *V. Barandovská*

Protokolo de la Ĝenerala Asembleo dum SUS 26 en San-Marino en la aŭlo de la gimnazio (Scuola Secondaria Superiore) kaj en Rimini / San Giuliano Mare en la paroĥejo de S-taj Johano kaj Paŭlo.

Vendredon, 2003-09-05, 15:15 h – 17:15 h, sabaton, 2003-09-06, 10:30 h – 13:00 h.

1. **Formalaĵoj**. La senata sekretario ADoc. Lewoc konatigas, kiuj el la ĉeestantaj efektivaj membroj havas kiom da transdonitaj voĉoj. Neniu ĉeestanto pridubas la kvorumecon de la asembleo. La protokoladon transprenas laŭ unuanima decido OProf. Fössmeier. La tagordo prezentata de la prezidanto, OProf. Frank, estas akceptita sen kontraŭvoĉoj, same la protokolo de la februara ĜA en Sibiu.
2. **Ĝenerala raporto** de la prezidanto.

2.1 En Sibiu-Hermannstadt (RO) je la 21a de februaro estis inaŭgurita komuna departemento de AIS kaj la ŝtata universitato *Lucian Blaga*, en kiu ĉiuj efektivaj membroj per instruado povas akiri honoran profesorecon.

2.2 En Komárno (SK) estas preparata la fondo de Libera Eŭropia Universitato, enhave gvidata de AIS kaj administrata de slovaka asocio S-COM, el kies ok societanoj sep apartenas al AIS.
2.3 La 19-an de majo, precize 20 jarojn post la fondo-statuto de AIS, ekvalidis la nova konstitucio, el kiu unu alineo (art. 12.4) restas decidenda de la aktuala ĜA. Ĝi decidas, ke alelektitaj senatanoj havu voĉdonrajton pri nesciencaj decidoj; en okazo de dubo pri la scienceco de decido decidas la plimulto de la senato.
2.4 Ankoraŭ en septembro okazos prov-SUS en Karlovo (BG).
2.5 OProf. Minnaja preparis la renovigon de la fondo-statuto. La oficialigo devus okazi je 2003-09-05 en San-Marino, sed estis prokrastita pro organizaj kialoj.
2.6 Por redifini nian pozicion rilate al nia naskiĝlando San-Marino estis preparita „Deklaracio pri San-Marino". La ĜA akceptas tiun deklaracion sen kontraŭvoĉoj.
3. **Financa raporto**. OProf. Lobin prezentas la bilancon, la spez-kalkulon kaj la buĝeton de la ne ĉeestanta trezoristo. La asembleo rifuzas decidi pri ili, ĉar ili ne aparte prezentas la datenojn por la Subtena kaj la Scienca Sektoroj. La trezoristo preparu disigitajn bilancon, spez-kalkulon kaj buĝeton, kiujn kontrolu komisiono el OProf. Wickström, OProf. Lobin, OProf. Frank kaj Dr. Macko; la konsento de tiu komisiono validu kiel senŝarĝigo.
La ĜA sen kontraŭvoĉoj decidas, ke 21/25 (84 %) el la kotizoj de la dumvivaj membroj de la SciS estu investitaj en la akademidomon en Komárno.
4. **Elektoj** por la senatperiodo 2004-2007.
4.1 La ĜA decidas per 22 kontraŭ 4 voĉoj, ke en la nova senato estu kvin senatanoj.
4.2 En sekreta voĉdonado la ĜA elektas kiel novajn senatanojn la plenrajtajn membrojn Minnaja, Quednau, Fössmeier, Wickström kaj Frank.
4.3 En sekreta voĉdonado la ĜA difinas jenan vicordon inter la plenrajtaj membroj kandidatiĝantaj kiel vicsenatanoj: Pennacchietti, Poláková, Maitzen, Sachs, Roux, Angstl, Bociort, Grego. Per tio la unuaj ses el ili estas elektitaj kiel vicsenatanoj. Escepte de la neĉeestanta OProf. Maitzen ĉiuj elektitoj akceptas aŭ estis anticipe akceptintaj. Se OProf. Maitzen ne akceptas, OProf. Bociort estos la sesa vicsenatano.
4.4 Laŭ propono de la Subtena Sektoro OProf. Pennacchietti estas unuanime elektita kiel „garantianto", kiu laŭbezone arbitraciu inter la anoj kaj la organoj de AIS.
4.5 La ĜA sen kontraŭvoĉoj decidas, ke OProf. Lobin kaj OProf. Weeser-Krell plu estu revizoroj. Por la posteno de vicrevizoro oni elektas Dr. Macko / ISKanon Polerani / ISKanon Hardegger.
4.6 La ĜA unuanime decidas, ke OProf. Grego estu en la portanta sanmarina asocio por la refondado de AIS laŭ san-marina juro, kiel unu el la eksterlandaj membroj apud OProf. Minnaja, OProf. Pennacchietti, OProf. Frank, OProf. Sachs kaj pastro Magnani.
4.7 Aktualigo de la regularoj. La decidoj pri ŝanĝoj en la regularoj estas komisiitaj al komisionoj, kiuj retpoŝte decidu kaj rajtas sen kontraŭvoĉoj akcepti ŝanĝojn. Pri partoj, pri kiuj estas kontraŭvoĉoj, decidos estonta ĜA. Estu en la komisionoj
- ĉiuj senatanoj kaj vicsenatanoj de la periodo 2004-2007
- la efektivaj membroj OProf. Holdgrün kaj OProf. Lobin
- Prof[T] Ŝilo, ADoc. Simonnet, ADoc. Lewoc kaj ASci. Clerici.

Komisionestroj estu la respondecaj ofic-direktoroj, kiuj jarfine transdonu la estrecon al siaj posteuloj.
5. **Eksigoj**. La prezidanto sendos al obstine nepagintaj AIS-anoj leteron, en kiu li eksigas ilin el la Akademio. Reaniĝo al ISK eblas nur per pago de la kotizo por dumviva membreco. Ŝuldoj ne nuliĝas per la eksigo.
6. La ĜA sen kontraŭvoĉoj decidas, ke la Arta kaj la Teknika Sektoroj prezentu po koncizan regularon kaj elektu po estraron kun 3 ĝis 7 anoj. Kiel sinonimo de „Teknika Sektoro" estos uzata la nomo „Scienc-aplika Sektoro".
7. Decido pri landaj asocioj estas sen kontraŭvoĉoj prokrastita al la ĜA dum la prov-SUS en Karlovo.
8. SUS 27 okazu, laŭ unuanima decido, en la semajno 2004-08-29 ĝis 09-04 laŭeble en Komárno (SK); se tio ne eblas, ĝi okazu samperiode en Sibiu (RO). Obstakloj pri la okazigo en Komárno estu raportitaj al la senato plej malfrue je 2004-02-15.

Protokolis:
OProf. Reinhard Fössmeier
Rimini, 2003-09-06

Konstituiga kunveno de la Senato de AIS por la jaroj 2004-2007, okazinta en la paroĥejo de S-taj Paŭlo kaj Johano, Rimini / San Giuliano Mare, 2003-09-06, 10h00-10h30.

Partoprenantoj: estontaj senatanoj Frank, Quednau, Fössmeier, Minnaja, estontaj vicsenatanoj Pennacchietti, Angstl

1. *Danko.* La reelektitaj senatanoj dankas al ĉiuj apartenantoj de la ankoraŭ deĵoranta Senato pro la plenumita laboro. Apartan dankon la Senato esprimas al OProf. Fabrizio Angelo Pennacchietti, kunfondinto de la Akademio, pro lia 20-jara laboro kaj unuanime elektas lin honora senatano.
2. *Disdivido de la Senataj taskoj.* La ĝisnuna prezidanto OProf. Dr. habil. Helmar Frank estas reelektita en sia ofico. Li akceptas sub la kondiĉo, ke li povu esti certa, ke posteulo troviĝos ek de 2008 kaj por la okazo, ke pro sanproblemoj li devos demisii antaŭe. Honora Senatano Pennacchietti kiel unua vicsenatano deklaras, ke en ambaŭ okazoj li estos je dispono aŭ zorgos pri alia kandidato.
   Por la ofico de la vicprezidanto la prezidanto proponas la ĝisnunan vicprezidanton OProf. Minnaja, kiu estas unuanime elektita. Same unuanime oni elektas
   - OProf. Bengt-Arne Wickström direktoro de la financofico kaj trezoristo
   - OProf. Reinhard Fössmeier direktoro de la inform- kaj de la protokol-ofico kaj senata sekretario
   - OProf. Hans-Dietrich Quednau direktoro de la ekzamen- kaj de la klerig-ofico
   - OProf. Carlo Minnaja direktoro de la struktur- kaj de la scienc-ofico
   - OProf. Helmar Frank direktoro de la identec- kaj de la honor-ofico

   Laŭ rekomendo de la respektivaj direktoroj la Senato elektas jenajn vicdirektorojn:
   - por la klerig-ofico vicsenatanon OProf. Eva Poláková
   - por la identec-ofico vicsenatanon OProf. Pennacchietti
   - por la honor-ofico vicsenatanon OProf. Hans Michael Maitzen
3. *Dekanoj por 2004-2007, proponoj al la sekcioj:*
   - Sekcio 1: OProf. Eva Poláková (akceptis)
   - Sekcio 2: OProf. Pennacchietti (akceptis)
   - Sekcio 3: OProf. Holdgrün
   - Sekcio 4: OProf. Angstl (akceptis)
   - Sekcio 5: OProf. Maitzen
   - Sekcio 6: OProf. Lobin (akceptis)
4. *Ekzamenofico 2004-2007, konstantaj membroj:*
   - Sekcio 1: OProf. Fössmeier
   - Sekcio 2: OProf. Korĵenevskaja
   - Sekcio 3: OProf. Minnaja
   - Sekcio 4: OProf. Angstl
   - Sekcio 5: OProf. Maitzen
   - Sekcio 6: OProf. Lobin
5. *Diversaĵoj.* Pri detaloj de eventuala BUS en aprilo 2004 en Bydgoszcz decidu la estraro de AKB.
   La ekzamenofico elektas laŭ propono de sia direktoro OProf. Poláková vicdirektoro.

Protokolis :
OProf. Reinhard Fössmeier
protokol- kaj informofico.
Rimini, 2003-09-06

Salutvortoj de la Prezidanto de UEA al la partoprenantoj de SUS 26 en la jaro de la dudekjariĝo de AIS

Se oni volus eluzi en ĉi tiu okazo la faman eldiron de Churchill, oni devus diri, ke « neniam tiom da parolantoj de la internacia lingvo ŝuldis tiom multe al tiom malmulte da homoj ».

La malmultaj homoj, al kiuj ni ĉiuj ŝuldas multon, estas la fondintoj kaj poste prizorgintoj de la agadoj de AIS dum la lastaj 20 jaroj. Inter ĉi tiuj malmultaj homoj aparte elstaran rolon havas profesoro Helmar Frank. Li estis la unua, kiu havis la ideon kaj poste la forton por realigi ĝin. Li havis la vizion, ke nia parolantaro bezonas universitat-nivelan instancon, kiu havu gradon de kontakto kun la normala universitata mondo, kaj kiu uzu plurajn lingvojn inter kiuj estu ankaŭ la internacia lingvo.

La respondo de la universitataj kolegoj parolantaj la internacian lingvon estis komence hezita, sed poste ĉiam pli firma, kaj nun ni venis al situacio, en kiu se oni pensas pri la universitato de Esperantujo, oni tuj pensas pri AIS.

Ne estas mia tasko memorigi vin pri la kvanto da studentoj, kiuj studas ĉe vi en pluraj lokoj tra la mondo. Ne estas mia tasko memorigi vin pri la kvanto da diplomoj divers-nivelaj, kiujn vi donis tra 20 jaroj. Sed jes estas mia tasko ĝoji pro tio, ke vi estas antaŭ promesoplenaj evoluoj, kiuj starigos vin ankaŭ jure kaj mure en kelkaj lokoj. En ĉi tiu momento mi pensas ĉefe pri Komárno, kie la revo de jardekoj ŝajnas realiĝanta.

Kiel prezidanto de Universala-Esperanto-Asocio mi povas nur bedaŭri ke la organizata parolantaro de Esperanto ne sukcesas subteni vin pli multe. Ni faras nian eblon kaj ni fieras pri vi. Mi ne blagas. Mi seriozas, ĉar mi mem ja vidis multajn parolantojn de la internacia lingvo en multaj landoj, kiuj fiere svingis vian nomon kaj vian ekziston en okazoj de renkontiĝo kun homoj, kiuj dubis pri la efektivaj potencialoj de la internacia lingvo por superaj funkcioj.

Longan vivon al AIS kaj multajn sukcesojn!

Renato Corsetti
prezidanto de Universala Esperanto-Asocio

(voĉlegita dum la solena fermo de SUS 26 la 5-an de septembro 2003 en San Marino Città)

DEKLARACIO PRI SAN MARINO
Aprobita post du jardekoj da aktivado de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino fare de la Generala Asembleo dum ĝia 29a kunsido la 5an de septembro 2003/1703 pfR fine de SUS 26 en San Marino[1]

AIS konsideras la Respublikon de San Marino sian hejmlandon kaj la fondo-decidon[2] faritan de ties registaro 1983-05-19 la bazon de sia ekzisto; ĝi tial daŭre konservas la nomon *San Marino* kiel parton de sia propra nomo.

AIS laboras tutmonde, plejgrandparte ekster la Respubliko de San Marino (unuavice en Eŭropio[3] kaj en Nordorienteŭrazio[4], sed ankaŭ en aliaj mondregionoj[5] kaj precipe virtuale),

- per sia varbado por la idealoj de demokrata[6] kaj kongnitiva[7] dulingveco,
- per sia strebado, revizie[8] liberigi pli kaj pli la sciencon esence tuthomaran[9] de ties originaj ligitecoj al la kreivaj kaj motivigaj fortoj de

Dichiarazione riguardo a San Marino
approvata dopo due decenni di attività dell' Accademia Internazionale delle Scienze (AIS) San Marino da parte dell'Assemblea Generale durante la sua 29-a seduta, il 5 settembre 2003/1703 pfR a conclusione della SUS 26 in San Marino

L'AIS considera la Repubblica di San Marino il proprio paese d'origine e considera inoltre la decisione presa il 19 maggio 1983 dal governo di San Marino di fondarla come la base della propria esistenza. Per questa ragione l'AIS conserva la dizione *San Marino* come parte integrante della propria denominazione.

L'AIS opera a livello mondiale per la maggior parte al di fuori di San Marino (in primo luogo nell'Unione Europea e negli altri paesi dell'Eurasia, ma anche in diverse parti del mondo e prevalentemente per via internet)

- promovendo gli ideali di un bilinguismo democratico e cognitivo,
- adoperandosi, attraverso un lavoro di revisione, a liberare la scienza – bene comune a tutta l'umanità – dai vincoli che ancora la legano a forze un tempo creative e motivanti, quali

---

[1] kompletigas la Deklaracion *de* San Marino, aprobitan 1999-09-03 en San Marino Città; vd. GrKG/H 40/4, 1999, 204, repr. en la AIS-trilogio (Fössmeier / Frank, 2000) 67 – 69.

[2] La decido estis unue publikigata en ILa traduko fare de ADoc. Mag. Yashovardhan en GrKG/H 24/2, 1983, 92 – 93. Ĝi troviĝas represita en la AIS-trilogio (Fössmeier / Frank, 2000), 67 – 69.

[3] la nuna Eŭropa Unio kune kun la antaŭvideble aliĝontaj ŝtatoj. La nocio kaj fakvorto enkondukiĝis per programiga teksto *„Was bedeutet und zu welchem Ende studiert man Eurologie? (Kion signifas kaj kiucele oni studas Eŭrologion?)"*, verkita de AIS-prezidanto Frank kaj EŭropaKlub-prezidanto Piotrowski surbaze de interkonsiliĝoj okazintaj en la Universitato de Sibiu-Hermannstadt jam 1994 dum la 3a Rumania Studadsesio de AIS. Vd. GrKG/H 38/2, 1997, 86 – 96. Repr. en Barandovská, 1999, 1126 – 1136, kaj en Piotrowski/Frank, 2002, 145 – 155.

[4] Temas pri la teritorio de la *Unuiĝo de Sendependaj Ŝtatoj* (t.e. la eksa Sovetio sen la tri baltaj ŝtatoj) fondita de Miĥajl Gorbaĉov.

[5] *Mondregionoj* en ĉi tiu senco krome estas ekz. Barato (la Hinda Unio), la teritorio de la Araba Ligo, Nordameriko, Sudameriko. Mondregiono estas plurnacia, sed kun iaj komunaj kulturaj trajtoj kaj plejofte kun centra kaj plejmulta lingvo uzata (aŭ almenaŭ taŭga) kiel interkompreniĝlingvo, dum kiam mankas oficialigo de neŭtrala lingvo.

[6] *Demokrata dulingveco* nomitas lingva ordo en pluropo de nacioj (precipe en federaciiĝinta mondregiono) tia, ke la unuopaj naciaj lingvoj estas samrange pritraktendaj, kaj kroma, neŭtrala lingvo estas enkondukita por interkompreniĝo inter la partneraj nacioj. La nocio kaj fakvorto ekestis en la Eŭropa Klubo kaj enkondukiĝis en la literaturon plej malfrue sur la paĝoj 33 – 34 de Frank, 1983.

[7] *Kognitiva dulingveco* signifas la uzadon de du proksimume sambone regataj lingvoj kiel pensad- kaj verkadlingvoj por eviti la dependiĝon de lingve fiksitaj penskliŝoj kaj de ambiguecoj ekzistantaj en po unu de tiaj laborlingvoj. AIS dekomence postulis kognitivan dulingvecon kaj verŝajne evoluigis la nocion. La fakvorto mem tamen verŝajne troviĝas la unuan fojon en Frank, 1998, p. 156. Vd. Fössmeier / Frank, 2000, 83 – 85.

[8] *Sciencrevizio* estas la klopodo, scienchistorie, terminologie kaj sisteme purigi la diversmaniere kaj diverskomplete komunikitajn, sciencajn ekkonojn de siaj originaj malperfektaĵoj por prepari ilian enigon en alstrebindan universalan enciklopedion. Vd. Frank, 1998, 152 – 157.

[9] Aludo al la baza principo kaj komenca frazo de la *Discours de la méthode* (Leiden, 1637) de René Descartes: «*Le bon sens est la chose du monde la mieux partagée*», pro kiu eblas postuli la intersubjektecon de la scienco.

- o raso kaj sekso,
- o klaso kaj lingvo,
- o kultura epoko kaj sciencista aĝo,
- o hejmlando kaj ŝtataneco,
- o politiko kaj religio,

kaj

- per sia klopodado kulturrimede, t.e. per rimedoj havigataj de scienca ekkonado kaj de sciencaplika (teknika) kaj arta kreado, kontribui
  - o en ĉiu unuopa nacio al la konservado de ties identigaj lingvo kaj kulturo,
  - o en ajna unuopa mondregiono diversnacia, diversŝtata kaj diverskultura al la evoluigado de paciga dua identeco specifa por ĝi kaj
  - o en la tuta mondo al kunigo de la intelektularo cele ekeston de transkulturaj kolegioj[10] kunlaborantaj tolereme kaj kompreneme sur neŭtrala lingva fundamento.

AIS esperas

- iam akiri en la Respubliko de San Marino konkretan, propran, centran administrejon
- kaj atingi de la Respubliko de San Marino la agnoskon de sia propraŭtoritate starigita konstitucio[11],

por ke tiel, en la hejmlando de AIS, ekestu mure kaj jure, sub la protektado de la Respubliko de San Marino, libera, internacia centro de la scienco transkultura.

- o la razza ed il sesso
- o la classe e la lingua
- o l'epoca culturale e l'età dei ricercatori
- o la loro patria e la loro cittadinanza
- o nonché la loro adesione politica e la loro confessione religiosa,

- e proponendosi di contribuire a livello culturale, cioè con mezzi derivanti dalla ricerca scientifica e dalla creatività in campo tecnico e in campo artistico
  - o alla conservazione in ogni singola nazione della lingua e della cultura che la identificano,
  - o allo sviluppo in qualsiasi regione del mondo in cui siano presenti più nazioni, più stati e più culture di una seconda identità ad essa specifica ed orientata alla pace,
  - o e all'aggregazione degli intellettuali di tutto il mondo in collegi transnazionali capaci di collaborare con spirito di tolleranza e di reciproca comprensione mediante una comune lingua neutrale.

L'AIS spera

- di stabilire nella Repubblica di San Marino il proprio centro amministrativo
- e di ottenere da parte della Repubblica di San Marino il riconoscimento dello statuto che essa si è autonomamente dato.

Ciò al fine che, nel paese d'origine dell'AIS, possa sorgere, sotto l'egida della Repubblica di San Marino, sia giuridicamente che materialmente, un centro libero e internazionale dedicato alla scienza transculturale.

Literaturo

Barandovská, V.: *Internacia Scienca Akademio kaj Internacia Lingvo – Projektoparo de Jan Ámos Komenský (Comenius).* GrKG/H 31/4, 1990, 155 – 158. (Repr.: Barandovská, 1999, 787 – 790)

Barandovská, V. (red.): *Kybernetische Pädagogik /Klerigkibernetiko.* Vol. 6, Bratislava 1993, vol. 10, Praha 1999.

Fössmeier, R., & H.Frank: *AIS.* Paderborn, 2000. (Kromvolumo al GrKG/H 40/1999)

Frank, H.: *Europäische Sprachpolitik – Aufgaben, Lösungsangebote und Schwierigkeiten.* En: *Politik und Zeitgeschichte* aldono B12/83 al *Das Parlament,* 1983, 26 – 38. (Repr.: Barandovská, 1993, 830 – 842, kaj Piotrowski/Frank, 2002, 79 – 91)

Frank, H.: *Die revidierte Wissenschaft zwischen Forschung und Lehre (Scienc-revizio inter esploro kaj instruado).* GrKG/H 39/4, 1998, 147 – 160. (Repr.: Pinter, 1999, 805 – 818.)

Pinter, A.-M.: *Kybernetische Pädagogik / Klerigkibernetiko.* Vol. 11, Praha 1999.

Piotrowski, S. & H. Frank (red.): *Europas Sprachlosigkeit / La senlingveco de Eŭropo.* München, 2002.

[10] Comenius revis (en *Via lucis,* Amsterdam 1668) pri „universala kolegio de kleraj homoj“ (*sapientium consociatione universali)* kun universala lingvo. AIS estas strukturita per tri tiaj kolegioj. Vd. Barandovská, 1990.

[11] unuafoje publikigita en GrKG/H 44/2, 2003, 100 – 119.

Richtlinien für die Kompuskriptabfassung

Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 2001 auch Artikel in allen vier anderen Arbeitssprachen der Internationalen Akademie der Wissenschaften (AIS) San Marino, also in Internacia Lingvo (ILo), Englisch, Französisch und Italienisch. Bevorzugt werden zweisprachige Beiträge – in ILo und einer der genannten Nationalsprachen - von maximal 14 Druckseiten (ca. 42.000 Anschlägen) Länge. Einsprachige Artikel erscheinen in Deutsch, ILo oder Englisch bis zu einem Umfang von 10 Druckseiten (ca. 30.000 Anschlägen). In Ausnahmefällen können bei Bezahlung einer Mehrseitengebühr auch längere (einsprachige oder zweisprachige) Texte veröffentlicht werden.

Das verwendete Schrifttum ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluss des Beitrags zusammenzustellen – verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a", „b", usf. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und Erscheinungsjahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenartikel werden - nach dem Titel - vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. – Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem, Zusatz „a" etc.) zitiert werden. – **Bevorzugt werden Beiträge, die auf früher in dieser Zeitschrift erschienene Beiträge anderer Autoren Bezug nehmen.**

Graphiken (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) und auch Tabellen sind als „Bild 1" usf. zu nummerieren und nur so im Text zu erwähnen. Formeln sind zu nummerieren.

Den Schluss des Beitrags bilden die Anschrift des Verfassers und ein Knapptext (500 – 1.500 Anschläge einschließlich Titelübersetzung). Dieser ist in mindestens einer der Sprachen Deutsch, Englisch und ILo, die nicht für den Haupttext verwendet wurde, abzufassen.

Die Beiträge werden in unmittelbar rezensierbarer Form sowie auf Diskette erbeten. Artikel, die erst nach erheblicher formaler, sprachlicher oder inhaltlicher Überarbeitung veröffentlichungsreif wären, werden in der Regel ohne Auflistung aller Mängel zurückgewiesen.

Direktivoj por la pretigo de kompuskriptoj

Krom germanlingvaj tekstoj aperos ekde 2001 ankaŭ arikoloj en ĉiuj kvar aliaj laborlingvoj de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, do en Internacia Lingvo (ILo), la Angla, la Franca kaj la Itala. Estas preferataj dulingvaj kontribuaĵoj – en ILo kaj en unu el la menciitaj naciaj lingvoj – maksimume 14 prespaĝojn (ĉ. 42.000 tajpsignojn) longaj. Unulingvaj artikoloj aperadas en la Germana, en ILo aŭen la Angla en amplekso ĝis 10 prespaĝoj (ĉ. 30.000 tajpsignoj). En esceptaj kazoj eblas publikigi ankaŭ pli longajn tekstojn (unulingvajn aŭ dulingvajn) post pago de ekscespaĝa kotizo.

La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete; plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo; en kazo de samjareco aldonu „a", „b", ktp. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De monografioj estu – poste – indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo) , la loko kaj la jaro de la apero kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. - En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a" ktp.). - **Preferataj estas kontribuaĵoj, kiuj referencas al kontribuaĵoj de aliaj aŭtoroj aperintaj pli frue en ĉi tiu revuo.**

Grafikaĵojn (kiuj estas havigendaj laŭeble kiel presoriginaloj) kaj ankaŭ tabelojn bv. numeri per „bildo 1" ktp. kaj mencii en la teksto nur tiel. Formuloj estas numerendaj.

La finon de la kontribuaĵo konstituas la adreso de la aŭtoro kaj resumo (500 – 1.5000 tajpsignoj inkluzive tradukon de la titolo). Ĉi tiu estas vortigenda en minimume unu el la lingvoj Germana, Angla kaj ILo, kiu ne estas uzata por la ĉefteksto.

La kontribuaĵoj estas petataj en senpere recenzebla formo kaj krome sur diskedo. Se artikolo estus publicinda maljam post ampleksa prilaborado formala, lingva aŭ enhava, ĝi estos normale rifuzata sen surlistigo de ĉiuj mankoj.

Regulations concerning the preparation of compuscripts

In addition to texts in German will appear from 2001 onwards also articles in each four other working languages of the International Academy of Sciences (AIS) San Marino, namely in Internacia Lingvo (ILo), English, French and Italian. Articles in two languages – in ILo and one of the mentioned national languages – with a length of not more than 14 printed pages (about 42.000 type-strokes) will be preferred Monolingual articles appear in German, ILo or English with not more than 10 printed pages (about 30.000 type-strokes). Exceptionally also longer texts (in one or two languages) will be published, if a page charge has been paid.

Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors (abbreviated if necessary) should be indicated. Monographs should be named along with place and year of publication and publisher, if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. – Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). – **Preferred will be texts, which refer to articles of other authors earlier published in this journal.**

Graphics (fit for printing) and also tables should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. and should be referred to as such in the text. Mathematical formulae should be numbered.

The end of the text should form the author's address and a resumee (500 – 1.5000 type-strokes including translation of the title) in at least one of the languages German, ILo and English, which is not used for the main text.

The articles are requested in a form which can immediately be submitted for review, and in digital form, too. If an article would be ready for publication only after much revising work of form, language or content, it will be in normal case refused without listing of all deficiencies.